

# FELIETONO.

BRONISLAW PILSUDSKI.

## Nasko, gravedeco kaj aborto ĉe la loĝantoj de la insulo Saĥalin.

(Fino).

Sed artaj abortoj okazas ĉe Ajnoj ne malofte; pli ofte, ol ĉe Gilakoj. La vivo de Gilakoj formiĝas pli normale, en limoj de la gentaj moroj, dum Ajnoj sur Saĥalino jam ĉirkaŭ du jarcentojn restadas sub forta ekstera influo — sub la invado de Japanoj. Tiuj ĉi en proporcie granda nombro invadas en la vivon de la ajna gento, ŝanĝante ĝin kaj altrudante elementojn, ne ĉiam kulturajn. Precipe ĉe la virinoj montriĝas la influo de la fraŭlaj fremduloj, serĉantaj kontentigon de la seksa voluptemo. Okazas nun grandega nombro da sekretaj rilatoj inter la virinoj kaj la alvenintoj kaj iĝis ne malofta la tipo de knabinoj, fordonantaj sin al prostitucio, nesufiĉe kaŝata. En ambaŭ okazoj la virinoj tute konscie evitas patrinecon kaj provas ĉiajn rimedojn, se ili akcidente gravediĝas.

La plej disvastigita rimedo estas ĉe Ajninoj jam de longe la mortigo de la embrio per premado de la ventro per manoj aŭ ia ajn peza objekto. Tiu operacio, kvankam aplikata jam de longa serio da generacioj, restis tiel same danĝera por la virinoj kaj malofte pasas senpune. Maljunuloj rakontis al mi, ke dum ilia junaĝo kelkaj virinoj pro ĉimaniara abortigo finis per rapida morto. Mi konis virinon, preskaŭ ĉiam malsanan kaj komplete kriplan, kiu ne povis sin bone rektigi kaj ankaŭ post nelonge mortis; oni rakontis al mi, ke antaŭ kelkaj jaroj ŝi ekŝancelis sian sanon per artefarita aborto en ĉi tia maniero. Sed la samaj maljunuloj certigis min, ke estadas ankaŭ tiaj artistinoj en tiu ĉi rilato, ke ili sen ia malprofito por si kelkajn fojojn mortigadis en si la feton.

Dua rimedo, povanta elvoki la deziratan aborton, estas forta kuntirado de la ventro, en ĝia supra parto, dum kelkaj monatoj de gravedeco. La fetu eliĝas antaŭ la templimo, sed restas en la sekvantaj monatoj doloro en la flankoj. Entute tiu ĉi rimedo estas tre maloportuna, ĉar, forte kuntirita, la virino ne povas bone labori kaj tiom malpli uzi la pasemajn ametaĵojn, pro kiuj ĝuste la virinoj ja rifuĝas al tiaj procedoj. Por eviti naskon, virinoj iafoje saltas de alte, ekzemple de la

ŝtuparo, kondukanta al provizejo, konstruita sur kolonoj.

Al „simpatiaj“ rimedoj oni devas kalkuli unu metodon, povantan laŭ la kredo de Ajninoj kaŭzi aborton. La graveda virino subtrancas ĝis la zono la suban vestaĵon, specon de nia ĉemizo, havanta ordinare la saman longecon kiel la supra vestaĵo kaj portas ĝin ĝis atingo de la dezirata efiko. Sed tiu ĉi metodo estas ŝajne malmulte disvastigita, ĉar rakontis al mi pri ĝi sole unu virino, dum aliaj pri tio neniam aŭdadis. Malnova kaj verŝajne ofte uzata rimedo estas fera rustaĵo, ĉar mi aŭdis tion kaj en la sudo kaj en la nordo de la orienta bordo. En la nordo ili aldonas ankoraŭ ian herbaĵon, kies nomon la viroj ne sciis kaj kun virinoj mi tie pri tio ne parolis.

Laŭ la klarigoj de maljunaj Ajnoj, artefaritaj abortoj estis praktikataj jam de malproksima estinteco, ĉar la knabinoj ĝuis en kompleta senĝeno seksajn rilatojn, sed hontis kaj ne volis havi idojn antaŭ la edziniĝo. Eble estadis en tiamaj tempoj ankoraŭ aliaj abortigaj rimedoj. Nune la virinoj uzas precipe japanajn rimedojn, kiujn alportadas laboristoj kaj oficistoj de la fiŝkaptaj entrepenejoj, dissemataj sur la tuta bordo de la suda Saĥalino. Sed mi ne sukcesis sciigi pri tiuj rimedoj de la japanaj fiŝistoj, kiujn mi pri tio eldemandis; aŭ ili fakte ĝin ne sciis aŭ timis malkaŝe pri tio paroli, ĉar la nova leĝo en Japanujo persekutas ĉiujn manipuladojn, celantajn malgrandigi la nombron de naskoj. Sed de unu pli klera Japano mi eksciis, ke kiel certa rimedo konsiderata estas safrano, kreskanta sovaĝe kaj en granda multo sur la insulo Hokkajdo. En Japanujo, kie la malobligado kaj interrompado de la gravedeco estas disvastigita, versimile estas ne malmultaj tiaspecaj rimedoj. Kaj Ajninoj fidas ĉi tiujn japanajn kuracilojn („sisiam kusuri“), sed ne malkaŝas la sekreton, ĉar sole sub tiu ĉi kondiĉo ili ricevas la medikamentojn, malpermesitajn nune en Japanujo.

*Trad. Regino Fels.*

## En tria semajno post la edzinigo.

Oni alportis al mi parfumitan vizitkarton, invitantan min al junaj geedzoj, kiuj ankoraŭ ne finis la mielan monaton de komuna vivado.

— Kiel feliĉaj ili certe estas — mi ekpensis — ĉar ili estas junaj, riĉaj, belaj... Kio do povas al ili manki?

Mi respondis, ke mi venos ĉirkaŭ la kvina horo vespere, post la fino de la ordinarciado hejme. Ĝi okazis somere. La aŭgusta suno superverŝis per siaj radioj la stratojn de Lwow, nenia venteto malvarmetigis la varmegigitajn murojn kaj ŝtonojn. Mi eksnorigis je la loĝejo de la junaj geedzoj.

— Ĉu la gesinjoroj estas hejme?

— Nur la sinjorino ĉeestas.

Mi petas transdoni mian bileton al la sinjorino.

Enirinte en la unuan ĉambron, mi ĉirkaŭrigardis. Ĉio estis tute nova. La mebloj, aĉetitaj ĉe Kirŝner, invitis por sidado. Ĉie estis eleganteco, eĉ ia lukso.

— Mi petas vin tien ĉi, aŭdiĝis alda voĉeto el la gasteĉambro.

Ĝi estis la domsinjorino mem, en la printempo de vivo, pala, malgraseta blondulino. Mi salute kliniĝis enirante kaj eksidis sur la indikita al mi apogseĝo apud la sinjorino.

— Ĝi estis mi, kiu petis vin, por ke vi nin vizitu.

La edzo eliris en la urbon.

— Per kio mi povas servi — mi demandis — rigardante esploreme la tutan malgrandan personeton.

— Mi estas tre malfortigita, sendorma, mi suferas je kapdoloro, kapturino, naŭzo.

Mi rigardis la dentkarnon, la konjunktivon de la okulo — ĝi estis tute pala, sensanga. La juna virino estis videble anemia. Kelke da aldonaj demandoj konvinkis min, ke mi ne eraris. Mi ordinarciis do ferozajn pilolojn, konsilis pli multe da movado kaj freŝa aero, frotadon de la korpo per malvarma akvo kaj poste mi leviĝis, por diri adiaŭ.

— Bonvolu ankoraŭ iom resti sinjoro, mi tre ŝatas la societeton de la instruitaj homoj, ĉar mi enuas terure.

— Vi, sinjorino, apenaŭ post tri semajnoj de la edziniĝo? Vi ne ankoraŭ eluzis la edziĝfestajn ŝuojn kaj vi jam enuas?

— Mi eĉ ilin ne portas, ĉar ili memorigas al mi la malsaĝajon, kiun mi faris.

Por la novedziniĝinta virino ne malbona komenco, kio estos post unu aŭ du jaroj — mi ekpensis.

— Sed mi ĉi tie babilas kaj min atendas malsanuloj.

Mi adiaŭas vin, ripetante: pli multe da aero kaj movado.

— Vi baldaŭ nin denove vizitos — ĉu ne vere?

— Mi petas min sciigi, se mi nur estos bezonata kaj mi tuj aperos.

Post kelkaj semajnoj oni alportas al mi leteron de la edzo de tiu ĉi sinjorino, en kiu li petegas min, ke mi tuj venu, ĉar la edzino estas tre suferanta. Mi prenis do fiakron kaj forveturis tien. La juna edzo atendis min en sia kabineto, promenadante je grandaj paŝoj.

— Kio okazis — mi demandis — pro kio la sinjorino malsaniĝis?

— Mi mem ne scias pro kio, sed ŝi estas tre malsana.

— Tamen io ajn certe okazis; kiel ĝi komenciĝis, klarigu al mi, ĉar la kuracisto bezonas ĉion scii.

Sur la vizaĝo de la juna edzo pentriĝis videbla batalo kaj hezito, ĉu silenti, ĉu paroli.

— Sinjoro, li diris fine, mi scias, ke la kuracisto estas kiel pastro kaj ne malbonuzos la sekreton. Mi rakontos do ĉion al vi, mi petas por momento sidiĝi.

— Hodiaŭ matene la frato de mia edzino, sentaŭgulo, kiel vi scias, matenmanĝante en restoracio kun samspecaj friponoj, kiel li, tiagrade ebriiĝis, ke la kolegoj estas devigitaj lin transporti hejmen. Unu el ili, timante, ke oni ion ŝtelos al la ebrulo, elprenis la monujon el lia poŝo kaj transdonis ĝin al mi por konservado. Ĉar mi volis scii, kion mi akceptas kaj kiom da mono tie estis, mi rigardis internen. Vi povas al vi prezenti mian miregon, kiam mi estis trovinta leteron sigelitan kaj adresitan per la mano de mia edzino al mia ĉefo. Kion ŝi povus skribi al li? Mia scivoleco estis tiel granda, ke mi disŝiris la koverton: la letero enhavis fikson de rendevuo en mia loĝejo. Mi kuris hejmen kaj la unua persono, kiun mi renkontis, estis mia ĉefo. Ne pripensante longe, mi ekkaptis lin je kolumo kaj malsuprenpuŝis de la ŝtuparo. Poste mi faris al la edzino jaluzscenon.

Tuj kiam ŝi estis eksciinta pri la okazintaĵo, ŝi estas kaptita de tiel fortegaj spasmoj, ke mi pensis, ke ŝi estas mortanta. Nun ŝi fartas jam pli bone, tamen estas ankoraŭ malbonege. Iru, sinjoro, tien, mi ĉi tie restos.

Mi eniris en la dormoĉambron. La sin-

lorino, duone vestita, kuŝis sur la lito, ĉirkaŭita per diafana kurteno; ŝi estis iom pli pala, ol antaŭe, sed ŝi salutis min ridetante kaj etendante al mi la manon. La aero estis plena je violodoro.

— Kio vin doloras?

— Ho, mi estas tre malsana, sinjoro doktoro. Mi havas dolorojn en la gorgo, en la brusto, la kapo al mi turniĝas.

— Kio kaŭzis tiujn ĉi suferojn, sinjorino?

— Mi ne scias.

Mi palpis la pulson — ĝi estis regula; mi pririgardis la langon, ĝi atestis al mi, ke la digestado estis en ordo; mi tuŝis la frunton, la frunto estis malvarma; la manoj ne tremis, kvankam mi supozis, ke mi trovos tiun ĉi simpton. Oni vidis, ke la ĵaluzsceno, kiun la edzo estis al ŝi farinta, ne tro ŝin ektimigis.

— Vi estos tute sana post kelkaj tagoj, mi petas nur, ke vi kuŝu en la lito, neniun akceptu kaj uzadu tiujn gutetojn, kiujn mi ordonos, po 15 gutoj trifoje tage. — Kaj mi ordonaciis laŭrajn gutojn.

Elirante el la domo, mi konsilis al la edzo, ke li lasu la edzinon dum kelkaj tagoj en kvieto kaj ne faru al ŝi iajn riproĉojn. Li promesis, ke li ĉi tion faros, sed petis min insiste, ke mi vizitu lian edzinon la sekvontan tagon matene.

— Mi volonte venos, sed ne pli frue, ol posttagmeze je la kvara, ĉar matene mi havas tre multe da okupo kaj la sanstato de via edzino estas tia, ke ĝi ne prezentas ian danĝeron.

La sekvintan tagon posttagmeze mi venis je la difinita horo. La juna edzo promenadis en la kabineto kaj lia vizaĝo esprimis grandan embarasecon.

— Kio okazis? — mi demandis. Ĉu eble la sano de via edzino plimalboniĝis?

— Ho! ne, sinjoro doktoro, al ŝi estas multe pli bone, sed al mi estas pli malbone. Prezentu al vi, ke ĉio ĉi, kion mi hieraŭ estis dirinta, estis malagraba ŝerco.

— Kiamaniere? — mi ekdemandis miregita — mi ne komprenas vin.

— Prezentu al vi, ke mia edzino por elprovi mian sindonecon interkonsentis kun la frato, ke li iaajnmaniere submetos al mi leteron, siksantan rendezuon kun mia ĉefo. La ŝerco estis, kiel vi vidas, tre stulta; mi estas nun malagrabe devigata peti lin pri pardono pro mia hieraŭa ekscito. Bonvolu nun iri al mia edzino, mi tie ĉi restos kaj skribos leteron al la estro.

Mi adiaŭis lin kaj direktis min al la dormoĉambro. Ĉi tiun tagon la sinjorino vestis sin, aŭ pli vere senvestigis sin senekzemple

kokete, ĉar ŝi kuŝis en la lito en tiel diafana jaketo, ke la formoj de ŝia bela korpo estis detale videblaj, eĉ la ĉemizo estis suprenvolita je la flankoj, kiel ĥlamido ĉe la antikvaj Grekinoj. La aero en la ĉambro estis troplenigita je bonodoro de violaj parfumoj.

— Kiel vi sanstatis hodiaŭ — mi demandis, alproksimiĝante al la lito kaj alŝovante seĝon.

— Hodiaŭ pli bone, la gutoj tre min helpis, sed mi sentas ankoraŭ pezecon en la brusto, mankon de apetito, kapdoloron.

— Ĝi pasos, sinjorino — mi respondis, esplorinte la pulson kaj la langon kaj konvinkinte, ke ĉio estas en ordo.

En tiu momento juna kaj vigla ĉambristino alportis teleron da supo.

— Sinjoro doktoro, ni petas pri pardono, se mi en via ĉeesto iom manĝetos.

Mi leviĝis, volante foriri, sed la sinjorino detenis min.

— Restu, sinjoro, ankoraŭ unu momenton, mi tuj estos preta, mi volus, ke vi per kusu min kaj aŭskultu, ĉu estas eble ia malordo en la pulmoj. Sidiĝu ĉi tie sur la sofo kaj trarigardu dume la hodiaŭajn gazetojn.

Mi sidiĝis sur la kanapo kaj komencis legi la lastajn telegramojn, pririgardante de tempo al tempo la belan malsanulinon, kiu eksidinte sur la lito kaj malsupreniginte la nudajn piedetojn sur ursan felon, kun la plej bona apetito englutis teleron da supo kaj alportigis al si la duan; poste estas alportita kotleto kun legomo, plue kokido kaj kompo, fine ia deserto. La malsanulino formangiadis unu post alia tiamaniere, ke sur la telero nenio restis. Kiom do ĉi tiu bela personeto manĝas, kiam ŝi havas apetiton, mi ekpensis, se ŝi tiom formangiis, senigita je apetito.

Dum la malsanulino ankoraŭ manĝis la deserton, la ĉambristino, evidente konfidenculino, kliniĝis kaj murmuretis ion en ŝian oreton.

— Mi konvinkis lin, ke ĉi estis ŝerco — rediris la bela sinjorino per sia alda voĉeto, kiu ne taŭgis por mallalita parolado.

— Kaj kiel li kondutas post tio? — demandis la ĉambristino.

— Li skribas leteron, enhavantan pardonpeton.

Ambaŭ virinoj ekridegis, rigardante reciproke en siajn okulojn.

— Mi estas jam preta, sinjoro doktoro, diris al mi la sinjorino post la tagmanĝo.

Mi alproksimiĝis al la lito kaj nur ŝajne ĉirkaŭfrapis kaj ĉirkaŭaŭskultis la brustkeston, ĉar mi vidis, ke ŝi volis nur min konvinki, kiel bonodora estis ŝia korpo kaj lito,

surŝprucigita per diversspecaj aromaĵoj; mi ordinaciis ian medikamenton kaj dirinte adiaŭ, mi eliris.

En sia kabineto iradis ankoraŭ grandpaŝe la kompatinda edzo kun la plumo en la mano kaj sur la tablo kuŝis folio da poŝta papero, sur kiu li jam estis skribinta kelkajn liniojn koncerne la peton pri pardono.

Pardonu al mi, sinjoro doktoro, ke mi vin ne akompanas ĝis la pordo, li diris al mi, ĉi tiu letero estas por mi tiel malfacila, ke mi devas tre kolekti la pensojn, por ĝin verki.

— Mi petas esti tute senceremonia por mi, mi respondis, skribu sinjoro, skribu sinjoro; ĝis revido!...

*Esperantigis Artur Adler.*

## AFORISMOJ KURACISTAJ.

### Kolektis d-ro Fels.

Bela virino estas duoble bela, se ŝi estas sana.

\* \* \*

La plej multaj homoj estas forte konvinkitaj, ke ili estas sanaj, ĉar ili ne sentas dolorojn.

\* \* \*

Medicino estas la plej nobla profesio, sed la plej bedaŭrinda metio. *Gusserow.*

\* \* \*

Ni kuracas la malsanulon, ne la malsanon.

\* \* \*

La kuracisto de la estonteco esta la internisto. *Kader.*

\* \* \*

La kuracistoj ofte plivolas suferi mizeron kelkajn jarojn en granda urbo, ol suferi mizeron la tutan vivon en malgranda urbeto. *Billroth.*

\* \* \*

Tra amasoj da kadavroj ni akiras niajn bonajn rezultatojn en ĥirurgio. *Billroth.*

\* \* \*

Nur bona homo povas esti bona kuracisto. *Nothmagel.*

\* \* \*

Ĉiu malsanulo havas sian malsanon kaj ĉiu ankaŭ havas sian bonŝancon en la kuracado. *Biernacki.*

\* \* \*

Kiu bone nutras, tiu bone kuracas.

*Leyden.*

\* \* \*

Kien suno ne penetras, tien penetras kuracisto.

\* \* \*

La homo, kiu renaskiĝas post grava malsano, transiras kvazaŭ ree ĉiujn periodojn de

la infaneco kaj juneco kun tiu diferenco, ke tio, kio iam estis kalkulata laŭ jaroj, kalkuliĝas en tiaj kondiĉaj laŭ semajnoj aŭ eĉ laŭ tagoj. *Sienkiewicz.*

\* \* \*

Kion morto forfalĉis, tion amo resemas — kaj tio estas vivo. *Sienkiewicz.*

\* \* \*

La aĝon de la homo oni devas taksi laŭ lia angiosistemo.

\* \* \*

Hipoĥondriulo mortas iafaje pro tro freŝa aero, kanto de najtingaloj kaj odoro de rozoj. *A. Grün.*

\* \* \*

Medicino okupas la tutan homon, ĉar ĝi priokupas sin pri tuta homo. *Goethe.*

\* \* \*

La temo en medicino restas ĉiam la sama, nur la melodio ŝanĝiĝas. *Hufeland.*

\* \* \*

En medicino la manko de sperto naskas malkuraĝon aŭ arogantecon. *Hipokrates.*

\* \* \*

Tiun, kiu ne volas obei, forlasu frue la kuracisto, por ke oni ne aljuĝu al li mem la malbonajn rezultatojn de la malsano, kies kaŭzo tiom ofte estas nur manko de obeeco ĉe la malsanulo. *Udeus.*

\* \* \*

Eĉ je unu horo ne estas permesite al la kuracisto mallongigi vivon de la paciento, suferanta eĉ plej grandajn dolorojn, sed mildigi dolorigan agonion la kuracisto devas.

*Nothmagel.*

\* \* \*

Adipozecon oni povas dividi en tri periodojn: 1. la periodo enviinda, 2. la periodo ridinda, 3. la periodo bedaŭrinda. *Ebstein.*